

## SALUTOJ KARAJ GELEGANTOJ

Karaj geamikoj: Nia Asocio bezonas aktualigi niajn registrojn de legantoj. Bonvolu sendi al ni viajn retadresojn kaj viajn telefonnumerojn.

Queridos lectores y lectoras, es de mucha importancia que ustedes nos envíen su correo electrónico, teléfonos, y si se han mudado su nuevo cambio de dirección y apartado postal. Recuerden que su contribución garantizará que ustedes sigan recibiendo, como es habitual, nuestra revista.

También, si usted lo desea puede colaborar con nosotros depositando su aporte en el Banco Plaza, en la cuenta corriente N°: 1380020130200004778, a nombre de la Asociación Venezolana de Esperanto, Rif J-00187020. Luego notifique su colaboración a la tesorera Elizabeth Garzón, por el teléfono: 0416.2110558 ó al correo electrónico: [elimir64@hotmail.com](mailto:elimir64@hotmail.com)

## NEŬTRALECO KAJ POLITIKO EN ESPERANTUJO

**Esteban Mosonyi**

La neŭtraleco de la Esperanto-movadoj, naciaj kaj internacia, estas bona, necesa, eĉ nerezignebla. Ene de Esperantujo povas ekzisti –fakte ekzistas- multe da submovadoj, labor-grupoj, teamoj malferme neneŭtralaj –tio tre normalas-, sed la trunkaj movadoj devas ne-eviteble persistadi en sia neŭtraleco, kiu estas esenca parto de la Interna Ideo. Bonaj esperantistoj akceptas, ne nur toleras, anojn de ĉiu ideologio, nacieco, religio, kaj aliaj ecoj diversaj. Sen tio Esperantujo eĉ ne ekzistus nek meritis ekzisti. Sed, ĉiam aperas iu “sedo” kiu nuancas ĉiuspecajn aferojn. Estas tute nefacile kompreni la veran sencon de neŭtraleco. Mi ne volas ĝin difini; tamen mi scias ke neŭtraleco ne estas ĉiam kaj ĉie la sama, ĝi havas sian propran dinamikon. En Venezuelo ne taŭgas la sama neŭtraleco kiel en Svedujo, kaj la koncepto multe ŝanĝiĝis en la lastaj jardekoj.

Ni ne povas esti neŭtralaj antaŭ la mizero, la polucio, la milito, la maljusteco, la tuta mal-bonestado de la planedo, inter aliaj egaj problemoj. En Venezuelo mem la situacio estas vere kom-plika kaj neniuj povas malatenti aferojn kiaj la konstitucia reformo aŭ la propono transiri al la tiel nomata “socialismo de la dudek-unua jarcento”. La fundamentalismaj defendantoj de iuspeca “pura” neŭtraleco malpermesas paroli pri po-litiko en movadaj sidejoj kaj kunvenoj. Mi perfekte komprenas ke ne decas paroladi ĉiam pri tiaj gravegaj kaj pezaj temoj, precipe kiam ili iĝas iome tiklaj, malkomodaj, foje polarizigaj.. Sed same ne eblas priparoli senĉese nekompromitigajn aĵojn, seriozajn aŭ banalajn. Ankaŭ la muziko kaj la poezio enhavas kelkfoje politikecajn aspektojn.

### **VENEZUELA STELO** **VENEZUELA**

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

58-0212.662.9224

<http://www.esperanto-ve.org>

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

**REDAKCIA KOMISIONO:** Félix García Blázquez,  
Jorge Mosonyi, Esteban Mosonyi, Juan Negrete y  
Nancy Aquino.

ELDONANTO:

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

<http://www.esperanto-ve.org>

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

#### **ESTRARANOJ:**

PREZIDANTO: Jorge Mosonyi

VIC-PREZIDANTO: Juan Negrete

ĜENERALA SEKRETARIO: Juan Miranda

KASISTINO: Blanca Elizabeth Garzón

#### **VOĈANOJ:**

Esteban E. Mosonyi (Interinstituciaj Rilatoj)

Nancy Aquino (Eldonado)

Ricardo Coutinho (Biblioteko)

Esperanza Pérez (Logistiko)

#### **KOMISIITOJ:**

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO: Ricardo  
Coutinho

ELDONAĴOJ: Nancy Aquino

VENEZUELA STELO:

Ricardo Coutinho

PRELEGOJ: Esteban E. Mosonyi

KONSILANTOJ: Félix García Blázquez, Esteban  
Mosonyi.

#### **ENLANDAJ DELEGITOJ:**

Alfredo Ovalles (Maracay),

Germán Montero (Maracaibo),

Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar).

#### **EKSTERLANDA DELEGITO:**

Andrés Turrisi (Italia)

#### **JUNULARAJ AFEROJ:**

Rikardo Coutinho

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene publikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

Alia malfacilaĵo estas la problemo de la esprim-libereco. Kiam la homoj kunvenas en iu ajn loko pro iu ajn kialo, ili ne emas stresigi nek sin senti mal-komfortaj. La ĉeestantoj simple deziras pasigi agrablan tempeton, parolante kaj babilante kun geamikoj, gesamideanoj, personoj reciproke simpatiaj. Tute maldecas la ĉesto kaj agado de disciplinigitaj policistoj, zorgeme observantaj ĉu iu ajn aŭdacas prituŝi politikaĵon aŭ ion similan. Antaŭ tiu manko de libereco la kunsido fariĝus subpremanta, sufoka, kio iompostiome fortimigus la partoprenantojn. Mi ne kredas ke mi troigas la problemon. Antaŭnelonge estadis en nia Venezuela asocio nemalgranda konfronto inter neŭtralemaj kaj politikemaj esperanto-tistoj. Miaflanke mi volis apartiĝi de ĉia konflikto, sed por tio mi devis ankaŭ redukti mian konversacion al minimumo pro la nura eblo ekdiri ion malkonvenan por iu aŭ ambaŭ partioj. Sendube iufoje la kuracilo ŝajnas pli malbona ol la malsano, eĉ povas pligravigi la malsanon. Oni certe ne povas vivi ĉirkaŭigita per tia nejusta streĉeco. Necesas eltrovi ĝustan ekvilibron meze de amo, kompreno kaj toleremo.

### **Rimarko**

Ni faris eraron en la antaŭa eldono pri la numero: ĝi estis la 78<sup>a</sup> kaj devus esti la 79<sup>a</sup> Pro tio, tiu ĉi eldono estas la 80<sup>a</sup>

Tiu ĉi revuo estas registrita kiel Nacia

Publikigaĵo: ISSN 1316-0451.

Esta revista está registrada como Publicación

Nacionalbajo el número: ISSN 1316-0451.

# SEKESEKEJMA, LA MAGIA VIOLONO

## Ŭarao rakonto

Esperantigis: Jorge C. Mosonyi

Ŭarao-indianoj rakontas ke, kiam la insulo Trinidado estis ankoraŭ unuigita al la Firma Tero, vivis en ĝiaj montoj iu nigra simio, tre ŝatita de la ceteraj bestoj. Naku –tiel li nomiĝis– kutimis amuzi siajn amikojn per la magiaj sonoj de violono konstruita de li mem, kiun li nomis Sekesekejma. Li tiel bone ludis ke, kiam la bestoj ĝin aŭdis, ili tremadis de la kapo ĝis la piedoj. Ritmo ekkaptis ilin, kaj sorĉitaj pro la violonmuziko, ili dancadis senhalte.

Tiumaniere ili vivis feliĉaj dum longa tempo ĝis iu tago, kiam la simio diris al siaj amikoj ke li volas ekkoni aliajn landojn, kaj tuj komencis prepariĝi por la vojaĝo. Iun matenon, kiam ĉio estis preta, oni vidis lin foriri el sia domo kaj subeniri la montojn, gaje ludante sian violonon.

Post longa promenado la simio alvenis al la valo kiu unuigis Trinidadon kun la Firma Tero. Tamen, apenaŭ li ekpaŝis sur ĝi, eksplodis terura ŝtormo. Ventoj blovis kaj batis tiel forte, ke ili elradikigis la arbojn kaj levis gigantajn ondojn sur la maro. Tamen la simio decidis pluri kaj sen maltrankviliĝi li daŭre ludadis sian violonon.

Kiam ĉesis la ŝtormo, la valo iĝis profunda abismo kovrita per akvo, kaj Trinidado restis por ĉiam transformita en insulon apartigitan de la cetero de la kontinento. Sed la simio jam estis sur la Firma Tero. Li estis alveninta al la Delto de la Orinoko, kie, allogitaj de la muziko de Sekesekejma, la bestoj komencis alproksimiĝi.

Sen kompreni pri kio temas, la magia muziko de la violono kaptis ilin kaj, preskaŭ

sen rimarki, ili ekdancis, la viroj ordiĝantaj en unu vicon kaj la virinoj en alian.

–Ni dancu! –ili diris–. Ni brakumu unu la alian kaj estu amikoj!

–Ne ĉesu ludi! –ili diris al la simio–. Kiel bone estas ke vi alportis vian muzikon. Vi devus resti kun ni por ĉiam.

Je tia akcepto la simio sentis sin tre komforte kaj respondis:

–Bone do, mi restos ĉi tie kun vi. Same kiel okazis al miaj amikoj de Trinidado, por kiuj mi ludadis antaŭe. Mi ĝojas ke vi ĉiuj estas tie ĉi, ke neniu mankas. Bone do, ni plue dancadu.

Oni rakontas ke tia estis la unua danco en la Delto, la unua *hohomare*, kiel ĝin nomas la ŭaraoj.

Sed la simio eraris. Ne ĉiuj bestoj troviĝis tie. Mankis unu, kies ekziston li eĉ ne povis imagi. Li neniam estis koninta ion similan. Temis pri Tobe, la tigro, timinda besto ĝis kies kuŝejo estis neniam alveninta la violonmuziko.

Ekvidante lian mankon, la aliaj bestoj komencis zorgi.

Tiel pasis unu tago kaj alia, sen ke la tigro aperu. Por eviti iun ajn surprizon, la bestoj decidis sendi mesaĝon al li, invitante lin al la *hohomare*.

La mesaĝo-portanto alvenis al la kuŝejo de la tigro, kie li trovis lin duonendormita, kaj pleniĝante je kuraĝo li diris:

–Saluton, Tobe. Ĉu vi nenion aŭdis? Nin vizitas nigra simio, kiu plenigas ĉies koron je ĝojo per sia muziko.

## 4/ Venezuela Stelo

---

-Kiu? - demandis la tigro, malfermante la okulojn.- Ĉu vi hazarde scias kiel li nomiĝas?

-Mi ne aŭdis lian nomon -respondis la mesaĝ-portanto. -Mi nur scias ke li venas el Trinidado. Sed tio ne tro gravas -li aldonis-, kio vere gravas estas ke li alportis instrumenton kies muziko igas nin forgesi malamon kaj fariĝi amikoj. Kial vi ne venas kun ni?

Tobe restis pensanta dum momento, kaj kun ridego li ekkriis:



-Mi bone scias pri kiu temas. Li estas Naku! Vi ne scias kion vi petas, mi neniam povus esti lia amiko. Lia karno estas la plej bongusta de la tuta mondo.

-Vi prefere reiru al la dancejo -li aldonis- kaj diru al via muzikisto, ke neniu invitis lin al ĉi tiuj teroj, ke li estas entrudulo. Ke li prepariĝu por ricevi mian viziton. Post tri tagoj mi estos tie, aŭ kie ajn li estos. Mi

kaptos lin kaj manĝos lin. Mi ja diras, lia karno estas la plej bongusta de la tuta mondo!

Ekkoninte la teruran novaĵon, la bestoj sentis timon kaj malgajon, pro kio ili petis al la simio ke li forfuĝu:

-Naku, pro via sano, foriru. Aŭskultu, memoru ke vi ne konas tiun beston. Li estas tigro, sovaĝbesto kiu ŝatas formanĝi aliajn bestojn. Li jam diris: ĉiun karnon li ŝatas, sed nenium kiel la vian.

La simio aŭskultis ilin atente, sed li ŝajnis ne tro zorgi pro iliaj avertoj.

-Kredu al ni -ili insistis-. Tobe forigos vin. Li neniel similas al ni, ĉar ni scias esti bonaj amikoj. Malgraŭ ke li vivas ĉi tie, en la sama arbaro, li ne ŝatas havi amikojn, kaj kiam li nin kaptas, ĉio finiĝas!

La simio konservis la trankvilon meze de la petegoj de siaj novaj amikoj, kaj tute trankvile li plue ludadis sian violonon. Je la mateniĝo de la tria tago, ĉiuj atendis ke la tigro aperu.

-Ve al vi, kompatinda Naku! -ili diris timoplenaj-. Povra simio, kia domaĝo ke via karno estas tiel bongusta.

Tiel ili plue plendadis, dum la tigro, singardema, alproksimiĝis al ili pli kaj pli, ĉiam pli.

Subite, Tobe aperis. Tie, en la kalvo de la arbaro, antaŭ ĉiuj, kaj direktante sin al la simio, li diris:

-Do, ĉu vi ne foriris?

-Kaj kien mi iru, do? -respondis Naku-. Ĉu vi ne diris ke vi formanĝos min kie ajn mi estos?

-Ĝuste tiel -diris la tigro-. Krome, nun vi ne povas transiri la akvojn kiuj nin apartigas de Trinidado por reveni al via hejmo.

## 5/ Venezuela Stelo

---

-Certe –diris la simio-, sed konsiderante ke tiu ĉi estas mia lasta tago, donu al mi la ŝancon ludi unu plian muzikpecon per mia violono. Poste, se vi volos, vi povos manĝi min.

-Bone –diris la tigro-, mi havas nenion por perdi.

La simio prenis sian violonon kaj komencis ludi. Li tiel bone ludis ke la tigro, senvole, movadis la okulojn tien kaj reen. Tiam subite li saltis. Ĉiuj ĉesis spiradi. Li ekstaris sur siaj malantaŭaj piedoj, kuntiris la kapon malantaŭen, kaj tuj ekdancis laŭ la ritmo de la violono, dum li petegis al la simio:

-Aj, Naku!, kiel mirinda muziko! Mi neniam aŭdis ion similan! Ne haltu!

Kaj li aldonis:

-Mi neniam imagis ke vi povas ludi ion similan. Kiel bela muziko, ĝi vere feliĉigas ĉiun!

Sen ĉesi dancadi, la tigro alproksimiĝis al la simio, kaj ĉirkaŭprenis lin dirante:

-Ni estu amikoj, fratoj! Via muziko sorĉas min kaj igas min dancadi pro ĝojo.

En la brakoj de la tigro, la simio devis ĉesiĝi la ludadon. Li subenigis sian violonon, kaj brakumante sin ili ripetadis:

-Amikoj, fratoj!

La ceteraj bestoj retrovis la spiron kaj iom post iom komencis ĉirkaŭstari la violonon por vidi de proksime tiun magian instrumenton, kapablan transformi en amikon eĉ sovaĝan beston kiel la tigro.


Tre atente ili ekzamenis la kapon kaj la kolon, la buŝon kaj la langon, la korpon kaj la dorson de la violono, ĝis ili sukcesis observi ĝiajn plej etajn detalojn.

Kaj tiel bela aspektis al ili tiu Sekesekejma kun siaj kordoj el ege fajna drato, ke ili decidis ĝin nomi *iboma sanuka*, kio signifas “eta virino”.

Oni rakontas ke, ekde tiam, Sekesekejma vivas kaj kantas en la Delto de la Orinoko, plenigante je ĝojo la koron de la ŭarao-indianoj.

*Noto: Sekesekeima* estas tradicia rakonto de la ŭarao popolo, indiĝena etno situanta en la Delto de la rivero Orinoko (orienta regiono de Venezuelo), kies nuna enloĝantaro atingas ĝis almenaŭ 20.000 personoj. La teksto ĉi tie prezentita estas tradukita el dulingva (ŭarao-hispana) eldonajo kies titolo estas *Sekesekeima, el violín mágico* (Ed. Monte Avila, colección Warairarepano. Caracas, 2005). La rakonto temas pri la ĉeesto de la violono en la tradicia ŭarao kulturo, mitologie interpretita per bela kaj originala stilo.

Pro vivi la vivon tutlibere  
kaj pensi ke la aidoso  
nur atakos al alia persono  
nun mi estas en tiu ĉi  
tombo



### Naciaj Novaĵoj

●  
● Je la unua de Oktobro komenciĝis la interfakultata kurso de Esperanto, kiel kutime en la Centra Universitato de Venezuelo (UCV). La kurso okazas merkrede de la tria ĝis la kvina pm, en la lernejo pri Filozofio, salono 213<sup>a</sup>.

●  
● Je la 17<sup>a</sup> de Novembro okazis la Jara Asambleo de la Venezuela Esperanto-Asocio. En tiu ĉi nia Asocio ŝanĝis la dujaran estraron.

●  
● Je la 15<sup>a</sup> de Decembro okazis la Zamenhofa Vespero en la domo de Nancy Aquino

### Internaciaj Novaĵoj

●  
● Je la 13-a de aprilo 2007 okazis la unua internacia konferenco pri "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj". La iniciato venis de la Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco kiel reago al letero de Eŭropa Jurscienca Universitato "Justo", kiu enhavis proponon enkonduki Esperanton en studplanojn de rusiaj klerigejoj. La raporto pri tiu ĉi konferenco aperas en: <http://planedo.ru/sobytia/konf> (oficejo@eventoj.hu)

●  
● Radio Altiva en Esperanto jam plenumis unu jaron de funkciado, je la 21-an de septembro. Tiu ĉi radio estas aŭspiciata de Urugvaj E-Asocio. Oni povas aŭskulti ĝin pere de: <http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

●  
● UEA-Indiĝenaj Dialogoj estas taŭga por eniri al UN, ĉar je la 13<sup>a</sup> de septembro 2007 estis aprobita la "Deklaracio pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj". Tiu rezolucio kongruas perfekte kun la projekto Indiĝenaj Dialogoj, apogita de la Esperanto-Movado ekde 1998. Bedaŭrinde kvar el la membroj de UN

voĉdonis kontraŭ la rezolucio: Usono, Novzelando, Kanado kaj Aŭstralio. ([www.raporto.info](http://www.raporto.info))

●  
● Je la 14<sup>a</sup> de septembro la Akademio de Esperanto elektis John Wells kiel prezidanto. Renato Corsetti kaj Probal Daŝgupta (nova prezidanto de UEA) estas sekretario kaj vicprezidanto, respektive, de nia Akademio. ([www.raporto.info](http://www.raporto.info))

●  
● "Team Esperanto" de la Projekto Gutenberg eldonas per interreto librojn libere. Ili bezonas ke verkistoj de la Esperanta Mondo donacu siajn kopirajtojn por riĉigi la kolekton, por doni al retuzantoj verkaĵojn senpage. ([www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org) kaj [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org))

●  
● Por festi la centjariĝon de UEA, estis elektita per konkurso la nova simbolo. Ŝajnas ke tiu simbolo estis farita de Guillem Sevilla, profesia desegnisto de la Esperanta Kataluna Junularo de Barcelono. ([www.uea.org/dokumentoj/simbolo/](http://www.uea.org/dokumentoj/simbolo/))

●  
● La 92<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto okazis en Jokohamo (Japanio). Ĉeestis 1900 partoprenantoj el 57 landoj. La temo estis "Okcidento en Oriento. Akcepto kaj rezisto", kaj la rezolucio diras ke oni devas profiti la venontan jaron (Jaro de la Lingvoj) por plifortigi la kunlaboron kun UN rilate al egalrajtoj por diversaj kulturoj kaj Esperanto kiel bona komunikilo. ([www.raporto.info](http://www.raporto.info))

●  
● La nova Estraro de UEA, je la 9-a de aŭgusto en la Jokohama UK, decidis ke la 94-a Universala Kongreso de Esperanto (2009) okazos en Bjalistoko, Pollando. La ĉefa celo estas omaĝi la 150-an detrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof en lia naskiĝurbo mem. ([www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu))

# ĈU EBLAS PAROLI KUN SINJORO AJNULO,

Antonio Crema  
Elhispanigis Andrés Turrisi

Timide, ŝajne, li alproksimiĝis al la skribtablo kun la indiko INFOR-MEJO. Fraŭlino sidanta kaj konvene ŝminkita, senprokraste priatentis lin. Verdire, estis neniu alia priatentenda: estis la oka matene

-Bonan matenon, fraŭlino.

-Bonan matenon, sinjoro. En kio mi povas helpi vin?

Li ridetis, kontenta, kaj diris:

-Helpi. Ĝuste tio. Tiu estas la vorto korekta.

-Do, kion vi deziras?

Li supiris, kvazaŭ pensante pri io neebla.

-Mi volas paroli kun iu amiko mia kiu deĵoras ĉi tie.

-Certe, sinjoro. Kiel nomiĝas via amiko?

Li eligis poŝtukon, kaj ĝin trempis per sia ŝvito.

-Jen la problemo. Mi ne scias kiel li nomiĝas.

-Vi ne scias kiel li nomiĝas? Kaj li estas via amiko?

-Ĝuste tiel. Ĉie oni plendas al mi pri la samo. Mi klarigos tion al vi. Mi posedas teruran memor-malkapablon pri la nomoj. La nomon de li – cetere amiko intima – mi ne sukcesas enmemorigi. Mi ĉiam forgesas ĝin.

-Mi bedaŭras, sinjoro, sed tiukaze mi ne povas...

-Fraŭlino, mi petas! Vidu, ni povus provi ion kio...

Iom post iom, la homoj estigadis vicon malantaŭ li.

-Provi kion? Sinjoro, bonvolu, jam ĉeestas multaj personoj kaj...

-Bonvolu atenti. Kiam mia amiko, tiu kiun mi serĉas, deĵoris en la Ministerio pri Sano, okazis al mi la samo; kaj tiam sin prezentis al mi genia ideo por solvi la situacion.

-Sinjoro, mi petegas vin...

-Atendu unu momenton. Mia memoro misfunkcias de nomo al vizaĝo, ne de vizaĝo al individuo. Aŭ inverse. Mi ne rememoras.

-Sinjoro...

-Mi klarigas: se mi aŭdas la nomon de mia amiko, mi tuj komprenas kiu li estas. Kaj inverse: se mi lin vidas, mi rememoras kiel li nomiĝas... Mi do proponas al vi fari kion iun fojon mi faris en la Ministerio pri Sano.

La homoj senpacienciĝadis. Jam ĉeestis ĉirkaŭ kvindek personoj.

-Kion vi faris? –ekkriis despere la fraŭlino.

-Se vi estus tiel kompleza legadi al mi, malrapide, kompreneble, la liston de la personaro oficanta en ĉi entrepreno, mi certigas al vi ke tuj post kiam vi estos nomumanta mian amikon mi diros al vi –li laŭtigis la voĉon- Estas li!

Se la fraŭlino estintus sola, estiĝintus tomba silento. Sed nun kelkcent personoj atendis priatenton,

kaj la tumulto komenciĝis senprokraste.

Kiam la pordisto sukcesis kvietigi la amason, ĉar ekzistas pordistoj kiuj kapablas kvietigi amasojn, la fraŭlino serene diris:

-Sinjoro, mi tre bedaŭras, sed tio ne eblas. Mi petas vin cedi la vicon al la ceteraj.

Li retiriĝis ŝajne timide. La homoj komencis paŝi. La fraŭlino, jam trankvila, afable priantis ĉiujn. La etoso jam estis serena, kun la klimatizilo funkcia kaj ĉio alia en ordo. Eĉ la entrepreno ekfunkciis.

Tuĵe, denove sin prezentis li...ŝajne timide. Li estis denove enirinta en la kolumnon. Estis nun lia vico. Oni devis lin prianti. Ĉiuj tiaj pensoj estis legeblaj en la okuloj de la fraŭlino.

-Sinjoro, je via servo – frida sed ĝentila.

-Dankon, fraŭlino. Pardonu ĉion antaŭan. Sed okazas ke nun, elirante, mi ne povis ne rimarki en tiu tabulo, tie maldestre, la organigramon de ĉi entrepreno. Kaj tial mi diris al mi mem: mi jam scias kiamaniere ne rabi tiom da tempo al tiu tiom simpatia fraŭlino kaj, krome, trovi mian amikon, ankaŭ li tiom simpatia sed kies nomon, cetere, mi ne rememoras.

La rigardo de la fraŭlino ĉiam pli fridiĝadis.

-Kaj?

-Mi rapide iros al la fondo de la afero... Okazas ke en ĉi entrepreno funkcias dudek departementoj. Ĉu ne?

-Tiel estas.

-Nu bone, anstataŭ legi al mi la tutan liston de la personaro, (mi konfesas ke temis pri troa peticio), vi nur faros dudek telefonavokojn: unu al ĉiu el la dudek sekretariinoj de la

dudek departementoj; vi diras al ŝi mian nomon kaj petas al ŝi bonvole demandi al la oficistoj ĉu iu konas min. Simple kaj mallonge. Tute certe mia nomo, por ĝin konigi al la sekretariinoj, estas Francisco Pérez.

-Sinjoro Pérez – ŝi jam sciis al kiu sin direkti- tiu ĉi estas plia sensencaĵo. Mi petas vin kompreni ke mi ne estas ĉi tie por legi listojn de loterioj nek por ludi enigmojn. Sekve, estus tre kompleza viaflanke ke... pardonu, sinjoro, jen venas la prezidanto de la entrepreno... flankeniĝu iomete... dankon...

- Francjo! Frato! Sed kien vi estis irinta? Plurajn tagojn mi atendadis vin! – kaj li brakumis Franciskon.

-Estas li! –kriis Francjo al la fraŭlino. – Nun mi rememoras, tiel kiel mi tion eksplikis al vi. Li nomiĝas Felikso Torrealba.

-Bonan tagon, sinjoro Torrealba-sukcesis diri la fraŭlino.- Sinjoro Francisko Pérez estas petanta intervidiĝon kun vi ek de frua horo.

-Kompreneble! –tondris la prezidanto – Eniru, Francjo. Vi estas en via hejmo!

Francjo alpaŝis, brakumita, al la prezidantejo. Sed antaŭ ol eniri, li revenis kaj diris al la fraŭlino:

-Mi petas, estu kompleza, kaj notu tion pri Felikso Torrealba, kaj gluu flanke unu fotajon, kaze ke mi forgesus.

Li sin direktis denove al la prezidantejo, sed pliafoje li revenis.

-Parenteze, kiel vi nomiĝas? Tio utilis, okaze de iu ajn urĝo...

(El: Los tomates no tocan el violín. Crema, Antonio. Editorial Ex Libris. Caracas, 1996. Paĝ. 33.



# CRÍTICA SOBRE UN CONCEPTO GRAMATICAL

Félix García Blázquez

Una definición bastante generalizada del adverbio dice así: “Palabra invariable que modifica al verbo, al adjetivo o a otro adverbio” Si aplicamos las reglas de la definición que nos enseñan en el bachillerato, llegamos a la conclusión que dicha definición no es aceptable, ya que el término a definir aparece en el contexto de la definición, además el modificar a un adjetivo es algo diferente de modificar a un verbo.

Vamos a examinar ahora, algunas palabras que están conceptuadas como adverbios - al menos en los diccionarios - que tienen forma o aspecto de adverbios y no son tales.

Utilizaremos un ejemplo de una oración subordinada adverbial y posteriormente una palabra que le sea equivalente.

El alumno terminó su tarea, antes de que finalizara el plazo

Evidentemente la oración adverbial subrayada complementa a la oración principal “El alumno terminó su tarea” y por su índole puede ser reemplazada por un adverbio v.g. “oportunamente”. En tal caso, este adverbio complementa a la antes citada oración. Ahora bien, como

tal función no está comprendida en la definición de adverbio generalmente aceptada; en este ejemplo pues, “oportunamente” no es un adverbio.

Existen otras palabras con la misma terminación de adverbio que ejercen una función no prevista en la definición de esta clase de palabra.

Se trata de los términos que indican la actitud del hablante con respecto a la idea expresada por la oración a la cual se refieren.

Ej. Felizmente ayer no llovió.

Otros vocablos, con la misma función son: “desgraciadamente, probablemente, indefec-tiblemente”, etc.

Las palabras “también, solamente”, y otras, pueden referirse a sustantivos pero los diccionarios lo consideran adverbios.

En consecuencia, si estas palabras no son adverbios ¿cuáles serían sus denominaciones correctas.?

**[felixgarciaablazquez@hotmail.com](mailto:felixgarciaablazquez@hotmail.com)**

# PRI TRANSITIVECO KAJ NETRANSITIVECO

Félix Gracia Blásquez

Kiam akuzativa komplemento akompanas verbon, tio povas signifi ke:

1 –Aŭ temas pri transitiva verbo, kaj la subjekto agas sur la objekton. Ekz.

Petro trinkas bieron

2 – Aŭ temas pri averbo netransitiva Ekz.

Johano iris Parizon

Ĉi kaze la subjekto nur agis sur sin mem, kaj la akuzativo anstataŭas prepozicion kiu indikas la finon de la ago. Tie. oni povas esprimi la saman ideon per

Johano iris al Parizo

Ni ekzameni alian ekzemplon

Tiu libro valoras dek dolarojn

Lau PIV “valori” estas transitiva verbo, sed okazas ke “valori” ne estas agverbo kaj la libro neniel povas agi sur la prezon., Alimaniere dirita: la inversigo de la propozicio.

Dek dolaroj estas valorata de tiu libro

Estas neniel konvinkiva., ĉar tiu eldiraĵo ne havas sencon

La problemo estas, ke akuzativa finaĵo reprezentas iun prepozicion ne esprimitan, Do, interesa estas identigi kiu estas tiu subkomprenita prepozicio pli preciza ol “je” en la menciita ekzemplo

3 – Alia eble nekutima klarigo estas la jena

Se “valori” ne estas agverbo, ĝi nepre estas statverbo, kiu ne povas havi objektan komplementon, do oni povus lice uzi.

Tiu libro valoras dek dolaroj

Tiu sinteno kongruas kun la zamenhofa konsilo: *En okazo de dubo oni uzu la nominativon*

Alia duba klasifo de PIV estas tiu pri la verbo “simili”. Tie ĝi estas klasifita kiel transitivan. Certe aperas ekzemploj kun akuzativaj komplementoj, kvankam ankaŭ aperas unu zamenhofa ekzemplo kun la prepozicio “al”.


Tiu gaja svarmado similis al la fajreroj en la cindroj

Do, tiu zamenhofa ekzemplo estas pli logika ol tiu kun akuzativa finaĵo, kiu povas generi impreson ke la verbo estas transitiva.

Konklude, oni rajtas uzi en statverboj nominativan komplementon, aliflanke se kun tiuj verboj oni uzas akuzativan komplementon, tio neniel signifas ke la verbo estas transitiva, sole nur ke la komplemento estas anstatauebla per vortgrupo (prepozicio + substantivo)

[felixgarciablazquez@hotmail.com](mailto:felixgarciablazquez@hotmail.com)

## La Mondo per Esperanto estas pli bona



# SUR LA INSULO DE NEMO

## (Enkonduko)

Johano Negrete

Estis jam la fino de la somero, longdaŭre atendata monato de septembro, en tiu alloga insulo de Nemo sur la Kariba Maro, kie vere ne ekzistas tiu sezono. Nemo jam pasigis tie iom pli ol unu monaton kun sia bela amikino de l' koro, la blonda Munja, en varma «ekstazejo de amoro». Tiele ni povas nomi tiun kaŝitan gastejon inter palmoj kaj blankaj plaĝoj ĉirkaŭantaj la marbordon je kvin kilometroj for de la plej proksima urbeto. La loko estis sanktejo por amantoj, al kiuj oni ne povus postuli plue reprimadon de pasioj, kies flamoj, se ja delonge briditaj en la forno de l' amdeziro, nun ellasitaj atingas eksplodon sur la sablo de tiuj ĉi paradizaj koralaj strandoj, liberigante la energion de la naturo kaj la sekretojn de geamantaj koroj.

Post la eksplodo, sur la sablo kaj ŝaŭmo alvenas la trankvilo, la silento, la intima revo, la profunda dankemo al la vivo, kaj sekve la senco de feliĉo per plenhaŭta dolĉa tuŝado inter du korpoj etenditaj, dum blankaj mevaroj silente superpasas kaj forfuĝas sencele.

Subite la tempo tiuloke tute ĉesis aŭ malaperis. La sunradioj, la dancantaj marondoj, kaj la freŝa venteto lulanta foliojn de palmoj kun birdoj ĝoje kriantaj faris el tiu loko paradizon de sekretaj amantoj. Ili devis nepre lukti kontraŭ la ordinara vivo, laboro, familioj, distancoj kaj devoj.

Fakte, ambaŭ vizitantoj, Nemo kaj lia amata Munja, estis atendintaj dum paro da jaroj, de kiam ili ekkonatiĝis tute hazarde

interŝanĝante mesaĝojn tra la interreto rilatajn al lingvokursoj, kiujn verŝajne iu organizaĵo aŭ nekonata fremda grupo planis promocii ĉe izolita vilaĝo en la nordaj landlimoj de la mondo. Kiam Nemo vidis mesaĝon en la ekrano de sia komputilo kaj respondis rapide per gratulaj vortoj al la iniciatintoj, nek li, nek ŝi, nek iu dio aŭ diino surtere aŭ surĉiele povus supozi tiam, ke tiuj simplaj kelklinioj da vortoj, rete interkruclitaj, havus estonte fortajn korajn konsekvencojn. Tamen tiu gesto de Nemo starigis la unuan ŝtoneton de singulara rilato inter du perretaj geamantoj, kaj kun la tempo, la ĝermo de pasiaj kaj ne kontrolataj deziroj puŝis la korojn al nepra renkontiĝo de korpoj, kies animoj jam delonge ĝuege retkonis unu la alian.

(daŭrigota)



E	S	P	E	R	A	N	T	O
		A		I	L	E	I	
		T		M		N	U	N
H	A	R	O		N	I		E
I	R	I	N	E		O	R	P
		N	E	P	O			R
O	L	O	V				A	E
D	A		N	U	N		V	
		M	U	Z	I	K	O	
A	M	I	K	E	C	O		

## LA SOMNAMBULINOJ

El Loco. Aŭtoro de Khalil Gibran  
Elhispanigis: Aquiles Rivas

En la urbo kie mi naskiĝis loĝis virino kun siaj filinoj, kiuj kutimis piediri dormantaj.

En iu nokto, dum la silento kovris la mondon, la virino kaj ŝia filino piediris domantaj ĝis la nebulkovrita ĝardeno.

Kaj la patrino parolis unue:

- Finfine! –diris- Finfine mi povas ĝin diri al vi, mia malamikino! Al vi, kiu detruis mian junecon, kaj konstruadas vian vivon sur la ruino de mia vivo! Mi volus vin mortigi! Poste, la filino parolis, per la sekvantaj vortoj:

- Ho virino malagrabra, egoisma kaj maljuna! Vi metiĝas inter mia plej libera mio kaj mi! Vi volus ke mia vivo estu eĥo de via propra velkinta vivo! Vi volus ke mi estu morta!

En tiu momento la koko kantis kaj ambaŭ virinoj vekigis.

-Ĉu estas vi, trezoro?- diris la patrino afable.

- Jes, estas mi, kara patrino –respondis la filino same afable

### Remitente/Sendinto

Asociación Venezolana de Esperanto  
Apartado 47675, Caracas 1041 – A

Verticales	
A.8	Konata Artikolo
B.7	(inv.) Sento simile al deziro
C.1	Ino kiu havas filon
C.9	Pronomo unua persono de la singularo
D.4	(inv.) Aro de Personoj
E.1	(inv.) Valoro kiun oni donas al iu
F.1	Prepozicio de direkto
F.6	Azia lando
G.1	Nea Korelativo
H.1	Korelativo
H.7	Patro de la patro
I.3	Adverbo kiu indikas urĝon

Horizontales	
1.A	Internacia Lingvo
2.E	Ligo de Instruistoj
3.G	Tempa adverbo
4.A	Fadenforma epiderma elkreskaĵo
4.F	Pronomo unua persono plurala
5.A	(Inv) Iri internen
5.G	(Inv.) Kaŭze de
6.C	Ido de gefiloj
7.A	(Inv) Menskapablo elektivigi ion
8.A	Prepozicio por indiki kvanton, mezuron
8.E	Tempa adverbo
9.C	Arto de son-vibroj
10.A	Rilato inter personoj bazita sur simpatio